


NEDERLANDA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA NEDERLANDA
ASOCIO ESPERANTISTA
„LA ESTONTO ESTAS NIA”
FONDITA 1905.

ENHAVO:

Natuurlijk ons eigen Leerboek	258
Ĉirkaŭ la Ĉefestrara Tablo	259
La Rondo Familia	260
Semajnofino en Emmen	261
Internacia Semajno Helsingör	262
Konkurso	263
Novaj Paŝoj	264
Bibliografio	265
Aŭtobuse al Danlando	266
La Studanto	269
Konsolo	269
De la Sekcioj	269
Poŝtosako	270
Verdlando Vokas	270

Redakcio: P. HENDRIKS, Verstolkstraat 7,
Leeuwarden. Telefono. 3292
Administracio: H. WENSEL, Gerard Schaep-
straat 7 — Amsterdam-W.
Pliaj informoj sur la banderolo.



18

11 SEPTEMBRO 1937

Ziedaar het antwoord op de vraag: Welk leerboek gebruiken wij in dit seizoen voor onze cursussen? Hierover mag en behoort geen twijfel te bestaan. Toen verleden jaar in onze vereniging de reeds lang gekoesterde wens van „een eigen leerboek” in vervulling ging, werd het verschijnen alom met grote instemming begroet. In een paar maanden waren meer dan 1400 exemplaren verkocht!

Voorwaar een schitterend resultaat voor onze *eerste eigen* uitgave en een prachtig voorbeeld van organisatiegevoel, solidariteit en discipline.

Smaken verschillen! Gelukkig maar, anders zou de wereld er raar uitzien. Echter bracht een enquête onder onze afdelingen en cursusleiders aan het licht, dat het *overgrote* deel *zeer tevreden* is over ons eigen leerboek. De recensent van „Laborista Esperantisto” schreef o.a.:

„Elk leerboek wil een verbetering zijn van alle vorige. Zo is ook hier een verbetering te constateren, in tweeërlei zin zelfs. Ten eerste — en dat blijkt een bijzondere drijfveer van den schrijver te zijn — in de oefenstof, waar losse zinnen bijna overal vervangen zijn door anecdoten, geestigheden e.d. Zeker zal dit den vertaler in verschillende opzichten ten goede komen. En voorts is in dit boekje met enkele verouderde opvattingen gebroken en zijn nieuwere naar voren gebracht.”

Juist de wil van den schrijver en van het hoofdbestuur om onze leden wat goeds en nieuws te bieden, bracht het verblijdende succes. Natuurlijk is ons leerboek niet volmaakt; zo'n boek bestaat er niet. Maar dat het beter is dan welk ander ook, bleek uit de vele ongevraagde berichten, welke wij van de gebruikers mochten ontvangen. Sommigen mogen dit of dat onderwerp gaarne anders behandeld zien, dit is gemakkelijk door iederen Esperanto-onderwijzer in de les naar omstandigheden en persoonlijke smaak te veranderen. Tenslotte zal de inhoud van geen enkel leerboek aan ieder volkomen bevrediging schenken. Een vaststaand feit is het echter, dat ons eigen leerboek „een gevaarlijke uitgave is voor. de concurrenten”; aldus een recensie in „Het Schoolblad”. En „De Volksschool” schreef: „Wij wensen L.E.E.N. succes en bevelen het boek warm aan”.

Gezien de beoordelingen van dergelijke competente recensenten en van de gebruikers, is het vanzelfsprekend, dat op *al* onze cursussen *weer* ons leerboek gebruikt dient te worden.

Ons eigen leerboek, *met het hulpboek!* Ja, dat hulpboek vindt men nergens. Wat is de fout van elk leerboek? Dat de cursisten de taal niet voldoende leren *spreken*. Daaraan komt het hulpboek op uitstekende wijze tegemoet. Goed sprekende Esperantisten worden zij, die met vrucht ons leerboek met het hulpboek

doorgewerkt hebben. Reeds na de eerste lessen beginnen de spreekoefeningen, die het dorre en droge van de spraakkunstlessen zo heerlijk onderbreken. Spelenderwijs komen de woorden en zinnen erin, went zich het oor aan de mooie Esperanto-klanken; door het hulpboek! Vandaar, dat wij leerboek en hulpboek niet afzonderlijk verkopen; zij behoren bij elkaar en zijn onafscheidelijk aan de gevolgde methode verbonden.


Moeten wij er nog meer van zeggen? Moeten wij nog vertellen, dat leerboek en hulpboek op uitstekend papier, met aangename letter, in een stevig omslag gedrukt zijn? Moeten wij nog eens herhalen, dat de prijs van zo'n uitstekend leerboek eigenlijk belachelijk laag is? Slechts f 1,20 compleet; voor cursusleiders f 1,10; voor afdelingen f 0,95! Natuurlijk weet U dit alles reeds.

Welnu, toont organisatiebesef en mijdt alle individualiteit! Uw eigen boekendienst staat weer klaar om U correct en vlug te bedienen.

Ook nu, in dit nieuwe seizoen, en verder steeds, gebruiken wij *natuurlijk ons eigen leerboek!* P. M. Mabesoone.

Voor Wie ?

Voor wie succes wil merken,
De boekendienst wil sterken
En serieus wil werken.



Afiŝoj : Al ĉiuj sekcioj ni sendis specimenon de nia nova propaganda afiŝo, kiun nia libro-servo liveras po 12^{1/2} c., minimume 10 ekzempleroj po 10 c. Ni atendas, ke ĉiuj sekcioj multe uzos tiun belan propagandilon kaj tuj mendos la deziratajn kvantojn.

Kelkaj personoj atentigis al ni, ke mankas sur la afiŝo la vorto „Esperanto“. Al tiuj ni deziras respondi, ke la celo de nia afiŝo estas scivoligi la publikon kaj devigi ilin al pli bona rigardo. Ni uzis tute neŭtralan „frapfrazon“ kaj disponigas al la uzantoj sufiĉe grandan liberan lokon, sur kiu oni povas presigi aŭ alglui ĉion, kion oni opinias dezirinda. Dependas ja multe de lokaj cirkonstancoj kaj personaj gustoj, kiun instigan frazon ni devas surprisigi. Nun ĉiu estas libera. Nepre oni zorgu, ke dum ĉi tiu sezono niaj afiŝoj brilu sur ĉiaj disponeblaj lokoj; certe oni rikoltos sukcesojn.

Propagando : Oni relegu la komunikojn en la antaŭa numero de nia gazeto kaj tuj mendu la flugfoliojn. Cetere estas dispone-

blaj la propagandaj kestoj ĉe la diversaj distriktaj ĉefestraranoj; helpe de ili oni tuj povas aranĝi bonan ekspozicion.

Propaganda servo : Al ĉiuj sekcioj ni jam dissendis nian unuan cirkuleron, tamen kelkaj sekcioj ankoraŭ ne respondis al nia alvoko, aliĝi al nia nova servo. Nepre oni tuj faru kaj agu laŭ niaj instigoj, por ke la propagando por nia lingvo okazu laŭ unueca sistemo.

Kandidatigo Prezidonto : Ni atentigis la sekciojn pri tio, ke la limdato por nomi kandidatojn estas la 1-a de Oktobro. Vidu la koncernan komunikon en n-ro 14.

LA RONDO FAMILIA.

●|| Samideanaj sentoj ligas diversnaciajn Esperantistojn; amikaj, eĉ parencaj rilatoj ekzistas inter la anoj de nia bona, paca, harmonia, unuiĝo L.E.E.N. Pri tiu stato ni ĝojas kaj tiun sferon ni volas flegi per la kreo en nia organo de nova rubriko, kiu nomiĝas „La Rondo Familia”. Ĝi aperos laŭbezzone kaj informos vin pri ĝojigaj kaj funebraj okazaĵoj en la familioj de viaj samasocioj. Pri naskiĝoj, gefianĉiĝoj, geedziĝoj, jubileoj, morto vi do informu la redakcion kaj pere de nia organo la anaro ekscios pri tio. Enpresigo okazos senkoste.

Ĉi supraĵn liniojn ni skribis en la pasinta semajno. Tiam ni ne povis antaŭvidi ke estos unu el niaj samsekcianoj, kies nomo kiel unua aperos en la nova rubriko. Tragika koincido! Mortis fraŭlino Wiersma. Nekrologon pri ŝi sendis la estraro de la sekcio Leeuwarden. Kaj la redaktoro de N.E. aldonas la esprimon de siaj sinceraj estimo kaj danko. Estis f-ino Wiersma, kiu transpenis de li la sekretariecon de la Frisa Rondo. Li do scias kiom da laboro postulis de ŝi tiu funkcio. Li ankaŭ scias, ke ŝi ĉiam akurate plenumis ĉiajn devojn. Ŝi estis Esperantistino, kiu senbrue kaj ofte nerimarkite efektivas sola pli da laboro ol dek parolemuloj intencas.... Nin iom konsolu la penso, ke tiu laboro havigis al ŝi multan kontentiĝon, ke ĝi plenigis kaj riĉigis ŝian vivon. Paca estu ŝia ripozo!

AGATHA MARIA WIERSMA †

La bato trafis nin! La 4-an de Septembro 1937 foriris el la tera vivo nia kara, fervora kaj sindediĉema sekretariino, Fraŭlino A. M. Wiersma, en la aĝo de 46 jaroj.

Multaj el la geesperantistoj, kiuj konis ŝin, verŝajne ne sciis, ke ŝi estas suferanta. La intimuloj tamen timis de la komenco de ŝia malsano, ke ĉi tiu estas grava, pli grava ol ŝi mem supozis. Jam dum la vintro ŝi sentis sin en ne-bona sanstato. Por tio ŝi ne kuniris al nia jar-kunveno en Den Helder kaj malakceptis la delegitecon. En aprilo ŝi iris en malsanulejon por radioterapio. Ŝi tiom resaniĝis, ke ŝi povis ĉeesti la klubkunvenon de la 27-a de majo. Sed la malsano ne estis for. En la lastaj tagoj de aŭgusto ŝi denove eniris la malsanulejon. Vizitoj ne estis permesataj. Ŝi, estante katolika, estis sanktoliata kaj ni tiam komprenis, ke post longa aŭ mallonga tempo ŝi ne plu estos ĉe ni.

La morto finigis pacience eltenitan suferon.

Kaj nun restas la memoro. Memoro pri sindona, fervora esperantistino, pri homo, kiu vere servis nian movadon, en kiu nia sekcio perdis mal-facile anstataŭeblan estraraninon. Ĉiam ŝi estis preta por fari la necesan laboron, varbi por nia afero, prizorgi la detalojn.

Kara Agato, ni ne havis okazon danki vin dum via vivo, sed estu konvinkita, ke vi estis por ni ekzemplo de bona esperantistino.

La esperantistaro perdis pro ŝia morto bonan, fidelan, sindoneman kaj kapablan aninon. Sekvu ni la ekzemplon, donitan de ŝi.

La estraro de „Frisa Esperantista Rondo”,
sekcio Leeuwarden de L.E.E.N.

SEMAJNOFINO EN EMMEN. LASTA ALVOKO ! ■

●|| Kiam vi ĉi tiun numeron de „N.E.” legos, karaj geamikoj, la semajnfino en Emmen jam proksimiĝas. (La 18-an kaj 19-an de Septembro.)

Jam multaj personoj aliĝis. Nun, 3-9-'37 jam 40 personoj anoncis sin. Ni sendis al ĉiuj sekcioj en la 4 nordaj provincoj cirkuleron kun detalaj informoj. Por tiuj, kiuj ne legis ĝin, mi volas ripeti:

La kostoj estos po f 2,50. Por tio ni havos ĉion, kion ni bezonos; tranoktadon, tagmanĝon, 3-foje buterpanojn, teon, kafon. Eĉ la vespermanĝon vi povos kunporti por la reirvojaĝo. La patro de l' junulargastejo promesis ĉion bone prizorgi.

Je la 7-a sabate ni akceptos vin. Malfermo je la 7.30 h. Sekvos: Amuza vespero.

Jam diversaj personoj promesis prizorgi programeron, i.a. sinjoroj Hans Bakker kaj Kalma.

La sekcio „Emmen kaj Ĉirkaŭaĵoj” ludos teatraĵeton, faritan de la Prezidanto.

Fraŭlino Feenstra pianludos. Belegajn kantojn ni elektis.

Dimanĉon ni promenis en la arbaro. En ĝi troviĝas dunoj, laĝetoj kaj dolmenoj.

Ĉar nia ŝatata redaktoro, sinjoro Hendriks, havas inklinon esplori la dolmenon, li almenaŭ zorgu por kelkaj ĝigantoj, ĉar li trovos ŝtonegojn.

Posttagmeze vizito al la zoologia ĝardeno. Unu el la frisaj vizitontoj supozas, ke ankaŭ la papagoj parolas Esperanton, almenaŭ la verdaj. Povas esti, samideano, ke ankaŭ ekzistas „Esperanto-parolantaj papagoj”.¹⁾

Kiuj ĝis nun ne anoncis sin, faru tion tuj, ĉar nun la tempo vere urĝas.

La ĝirkonto de la kasisto estas: 214513. Ni esperas, ke ni plene atingos nian celon: pli da kontakto inter la Esperantistoj el la 4 nordaj provincoj.

Verdstelanoj, nun mi diras: ĝis vido, sabatvespere en nia bela vilaĝo Emmen!
E. Cohen, sekr-ino.

¹⁾ Certe ekzistas „papage parolantaj Esperantistoj”. Red.

Directe of grammaticale methode ?

**De voordelen van beide, de nadelen van geen,
Dat geeft U 't nieuwe leerboek van L.E.E.N.**

●|| Same kiel en aliaj jaroj, la Dana Esperanto-Instituto aranĝis ĉi tiun someron internaciajn feriajn Esperanto-kursojn en la Internacia Altlernejo de Helsingör (= Elsinoro), „la urbo de Hamleto”.

Mi partoprenis en la karavano, organizita de T.A.G.E., al la internacia feria semajno Esperantista, kaj mi provos doni kelkajn impresojn pri la bela vojaĝo kaj la restado en Danlando.

La 6-an de Aŭg. posttagmeze je la 3-a la Nederlandaj partoprenantoj kunvenis sur la perono en Groningen, de kie la vojaĝo komenciĝis. La unuan tagon ni vojaĝis ĝis Hamburgo, kie ni estis akceptataj de tri Germanaj samideanoj, kiuj estis tiel afablaj, konduki nin al nia hotelo kaj poste montri al ni iom de la urbo. Ni trinkis teon en la Alsterpavilono, de kie ni havis belegan vidaĵon sur la rivero. La postan tagon ni jam frue forlasis Hamburgon por daŭrigi nian vojaĝon. Interesa estis la marvojaĝo de Warnemünde al Gedser, kiam la tuta vagonaro veturis sur la grandan ŝipon. Ni povis forlasi la vagonaron por enspiri la freŝan maraeron kaj rigardi la tutan ŝipon. Ni vere estis surprizitaj de la granda lukso de la dana ŝipo. Alveninte en Gedser, ni denove envagoniĝis kaj la vagonaro forlasis la ŝipon por veturigi nin tra la insuloj Falster kaj Seeland al Helsingör. Ĉe la stacidomo akceptis nin s-ro De Waard el Rotterdam, kiu kondukis nin al la Altlernejo.

●|| Kaj nun la restado en la Altlernejo. Ni vere vivis dum la tuta semajno en Esperantujo. Partoprenis \pm 82 samideanoj el 14 diversaj landoj. Kun ĝojo ni salutis multajn konatojn kaj konatiĝis kun aliaj. Unu horon post nia alveno s-ro Friis, la direktoro de la Dana Esp.-Instituto, malfermis la ferian semajnon kaj bonvenigis la novajn gastojn. La diverslandaj reprezentantoj parolis salutvortojn. Plue ni pasigis la vesperon per kantado, babilado, kafotrinkado, k.t.p.

La semajno vere forflugis tro rapide. Matene oni povis aŭskulti diversajn interesajn prelegojn de f-ino Noll (Kopenhago), f-ino Saxl (Berlino), s-ro Szilagyí (Hungarujo), s-ro De Waard (Rotterdam). Aŭ oni povis sekvi la preparan kurson, gvidatan de f-ino M. Saxl. Precipe por ĝeinstruistoj, kiuj intencas doni Cseh-metodajn kursojn, daŭrigajn kursojn aŭ infankursojn, ĉi tiuj lecionoj estis treege interesaj kaj lernigaj.

●|| Tiuj, kiuj ne ŝatis aŭdi prelegojn aŭ sekvi kursojn, povis pasigi la matenon ekz. sur la bela banstrando kaj ĝui freŝigan banadon en la pura akvo de Sont. Aŭ ili povis promeni kaj ripozi en la belega, granda, malnova parko, kiu ĉirkaŭas la Altlernejon.

Posttagmeze oni aranĝis por la gastoj ekskursojn al diversaj vidindaj lokoj. Mi volas mencii la viziton al la kastelo Kronborg, la boatekskurson al la sveda insulo Hven, la ekskurson al la bela urbo Helsingborg kaj Mölle. Dum ĉi tiu lasta eks-

kurso okazis interesa incidento. Iom norde de Helsingborg la sveda reĝo havas someran restadejon kun granda, belega ĝardeno. Libere ni povis eniri en la ĝardenon por rigardi ĝin. Subite ni vidis la Kronprincon, kaj nia sveda gvidanto, s-ro Fögelberg, estis tiel kuraĝa alparoli lin, dirante, ke en la ĝardeno estas grupo de Esperantistoj el 14 diversaj landoj. La Kronprinco tuj montris grandan intereson kaj venis al ni por saluti nin. F-inoj Noll kaj Saxl estis prezentataj al li. Tute senĝene la Princo parolis kelkajn momentojn kun ili. Entuziasmaj pri la aŭfableco de la Kronprinco, ni daŭrigis nian ekskurson al Mölle, ĝuante dum la tuta veturado la belegan naturon de ĉi tiu parto de Svedlando.

●|| Jes, la semajno, kiun ni pasigis en la Altlernejo, estis vere tro mallonga. Oni faris ĉion por igi al ni la restadon kiel eble plej agrabla. Ni ĝuis la belan naturon de Danlando, la belajn Esperantigitajn danajn kantojn, la dolĉajn kukojn, sed precipe la intiman, amikan kuneston kun tiom da diverslandaj samideanoj. Kaj tial mi varme rekomendas al ĉiu, kiu deziras pasigi ne tro multekostan ferion en vera Esperanto-sfero venontjare iri al Helsingör. Oni certe ne bedaŭros.

●|| Ankaŭ bonega propagando estis ĉi tiu Esperanta kunveno. En la lernejo ja loĝis ne nur Esperantistoj, sed ankaŭ multaj aliaj, kiuj sekvis ĉi tie aliajn kursojn. Kaj plurfoje okazis, ke ili mire aŭskultis la viglan konversacion de la diversnaciaj Esperantistoj. Pli ol unufoje ne-Esperantisto demandis: „Ĉu oni vere tiel facile povas interparoli per Esperanto? Mi ĉiam kredis, ke Esperanto taŭgas nur por korespondado. La lastan tagon de nia restado en Danlando ni pasigis en Kopenhago, „la gaja urbo sen mizero“. Per aŭtobuso ni faris rondveturadon tra la urbo kaj admiris la belegajn konstruaĵojn. Vespere ni vizitis „Tivoli“. Preskaŭ neniam mi vidis ion tian fabelan. Mi ne kapablas priskribi la belegan iluminadon de la grandega parko, la kolorhavajn akvofalojn, la ŝprucantajn fontanojn, la ravan muzikon en la koncerta salono. Ili faris al mi neforgeseblan impreson. La revojaĝo estis bona kaj prospera. En la vagonaro de Hamburg al Bremen sidis en nia kupeo kelkaj Svedoj kaj Danoj, kiuj faris ferian ekskurson al Kolonjo. Ni ekkantis la Esperantigitajn svedajn kaj danajn kantojn, kaj ili kunkantis en siaj lingvoj. Denove bona propagando por nia lingvo. Ni ĉiuj venis hejmen, plenkontentaj pri nia vojaĝo kaj kun novaj energio kaj entuziasmo por Esperanto. Sj. F.

KONKURSO.

●|| Finiĝis la ferioj. Dum tiu feliĉiga tempo multaj el ni havis la plezuron povi apliki sian Esperantoscion. Iuj vojaĝis al eksterlando kaj tie renkontis samideanojn; aliaj restis hejme sed ĝoje akceptis translimajn Esperantistojn. La redakcio supozas,

ke pluraj anoj tiel havis belajn momentojn, agrablajn renkontiĝojn, neatenditajn surprizojn, kiuj valoras esti kunĝuataj de aliaj. Tial ni petas vin raporti al ni pri tiuj „aventuretoj“. Ni atendas ne literaturajn perlojn sed simplajn raportojn, se eble en agrable leginda stilo. Tiujn ni intencas publikigi en N.E. Por kuraĝigi kaj rekompenci ni promesas al la plej bonaj kelkajn belajn libropremiojn.

Malgrava konkurso do! Atentu pri jenaj reguloj:

1. Skribu tre legeble.
2. Uzu 1 flankon de la papero.
3. Maksimume 500 vortoj.
4. Publikigado dependos de legindeco kaj libera loko.
5. Manuskriptojn ni ne resendos.
6. Prijuĝos la ensenditaĵojn senpartia komisiono.
7. Limdato 1 Oktobro.
8. Unu ano povos ensendi plurajn verkaĵojn.

SEMAJNFINO EN EMMEN.

Laŭ peto de fraŭlino E. Cohen decidis la administra estraro de L.E.E.N. sendi min al la semajnfino en Emmen en mia nova funkcio de ĉefkonsilanto.

Estus tre agrable al mi, se kiom eble plej multe da distriktaj konsilantoj, reprezentantoj de la sekcioj, anoj de la propagandaj komitatoj kaj interesigantoj pri propagandaj aferoj kaptus ĉi tiun okazon por reciproka interkonigiĝado.

Estas mia granda deziro, ke ni sukcesos havi apartan kunsidon, en kiu ni povos preparoli la ĝeneralan propagandon. Espereble ni povos fiksi planon, kiu estos efektivigata dum la venonta vintro-sezono. Tiel la semajnfino en Emmen postlasos duoble agrablan memoron.

Hans Bakker.



JUBILEUM-POSTZEGEL.

De Braziliaanse Minister van Verkeer en Publieke Werken, Dr. J. Marques dos Reis, beschouwt het „Gouden Jubileum“ van Esperanto als een feit van historische betekenis. Daarom geven de Braziliaanse Posten een speciaal Esperantopostzegel uit ter herinnering aan dit jubileum.

POOLSE GIDSEN.

Ter gelegenheid van het Jubileum-Congres in Warschau zijn geïllustreerde gidsjes in Esperanto uitgegeven van de bezienswaardigste Poolse steden, n.l. Warschau, Krakau, Gdynia en Wilna. Het gidsje van Warschau bevat o.a. afbeeldingen van het huis en het graf van Dr. Zamenhof en een naar hem genoemde straat.

ESPERANTO-AMBTENAREN BIJ DE JAMBOREE.

Om dienst te doen op het postkantoor van de Wereld-Jamboree 1937 te Vogelenzang werden alleen aangesteld ambtenaren, die behalve de moderne talen het Esperanto machtig waren.

ESPERANTO-PROSPECTUS VAN KRYNICA.

Van de Poolse badplaats Krynica, bekend door het bezoek van Prinses

Juliana en Prins Bernhard, is een mooi Esperanto-prospectus verschenen. Belangstellenden kunnen het gratis verkrijgen bij: Direkcio de Kuracejo (Inĝ. Leono Nowotarski), Krynica (Polen).

CATALOGUS VAN ESPERANTOLITERATUUR.

De Openbare Bibliotheek te Manchester bevat zoveel werken in en over Esperanto, dat een aparte catalogus is uitgegeven. Het boekje bevat een voorwoord van den hoofdbibliothecaris in het Engels en Esperanto.

POSTZEGELALBUM VAN JOEGO-SLAVIË.

De Posterijen in Joego-Slavië geven een postzegelalbum uit, waarin plaats is voor alle Joegoslavische postzegels van 1931—1936 en waarvan de bijbehorende tekst is gedrukt in het Kroatisch en Esperanto.

ESPERANTO : CONGRESTAAL.

Ter gelegenheid van zijn benoeming tot voorzitter van de Internationale Rotary Conferentie, te Nice gehouden, sprak de heer M. Duperrey een woord van dank in het Engels, Frans, Duits, Italiaans, Spaans en ook in het Esperanto.

VOOR DEN TOURIST.

Meer en meer gaan de badplaatsen en andere vakantie-oorden ertoe over de wereldtaal Esperanto te gebruiken om de buitenlandsche touristen te lokken.

E.N.I.T., te Rome, geeft een fraaie, in driekleurendruk uitgevoerde, brochure uit omtrent de hotel- en benzine-coupons, welke ten gerieve van de reizigers verstrekt worden.

Voorts verschenen er in de laatste weken vouwbladen en andere lectuur over de druipsteengrotten van Domica, Jasov en Bilskà in Tsjechoslovakije, over de badplaats Karlsbad, over Kuresaare (Estland).

ESPERANTO OP PARIJS STATION.

Op het station Saint-Lazare, te Parijs, zijn een vijftal beambten, die in het Esperanto inlichtingen kunnen verstrekken en die ter herkenning op de mouw de aanduiding „Esperanto” dragen.



(Recenzotaj verkoj estu sendataj sole al la redakcia adreso. Werken ter recensie te zenden aan 't adres der redactie.)

●|| „Japanujo, la lando de gusto, gracio kaj koloro.” Eldonis la Ministrejo de japana ŝtatfervojaroj. 17 paĝoj 21 × 23¹/₂ c.m. Bele presita gvidlibro kun multe da tre rigardindaj ilustraĵoj. Samideanoj postulu informon de Japana Esperanto-Inst. (1—13, Moto-maĉi, Hongoo-ku, Tokio) kaj pri fervojoj de Japana Esperantista Ligo Fervojista (ĉe T. Aoki, Hosen-ka, Koomu-kjoku, Fervoja Ministrejo, Tokio). Agrabla kaj fruktodona vojaĝo estas efektivegebla per Esperanto. Oni ne indikas kiel havigi al si la monon....

Pli atingebla estas *Aŭstrujo*, pri kiu lando atentigas nin nova bele presita kaj riĉe ilustrita gvidlibro „Aŭstrio — la Esperanto-lando”, 40 paĝoj 11 × 20¹/₂ c.m. Depost 1928 la Ministerio por Komerco kaj Trafiko regule eldonas tiajn belaspektajn, purlingvajn Esperanto-gvidlibretojn, pro kio ĝi meritas la

sinceran dankon de la Esperantistaro. Esperanto-informojn donas kontraŭ respondkupono: Esp.-Varbadservo por Aŭstrio, Wien I, Neue Burg.

Alispeca gvidlibro estas „**Commisariat de Propaganda al la Internacia Esperanto-Konferenco de Paris**”, 8 paĝoj $19\frac{1}{2} \times 27$ c.m. Per ĝi „La registaro de la „Generalitat de Catalunya” salutas la Internacian Konferencon en Parizo „Esperanto en la Moderna Vivo”, dezirante al ĝi plenan sukceson por la bono de Esperanto kaj kulturo.” Per kvar bele ilustritaj artikoloj: „La kontraŭfaŝista kunligo de ĉiuj Esperanto-societoj en Barcelono”, „La historio de popolo (1931—1937)”, „La nova unuiĝinta lernejo en Hispanujo” kaj „Hispanujo kaj la publika opinio” ĝi gvidas nin en la terurajn cirkonstancojn, pro kiuj la hispana popolo nun ege suferas. S. S. de J. Dzn.

AŬTOBUSE AL DANLANDO. ■

●|| Sabate, la 17an de Julio, en la frua mateno. Antaŭĝojante la proksiman restadon en internacia kampo aŭ ĉe gesamideanoj, ni atendas la aŭtobuson, ĉirkaŭataj de kofroj kaj aliaj aĵoj sam-specaj. Jen! ĝi venas. Dum helpopretaj manoj rapide metas la pakajojn sur la aŭtobuson, aŭdiĝas la salutoj kaj bondeziroj. Oni faras la lastajn aranĝojn. Ankoraŭ unu momenton! Tiam malrapide la aŭtobuso ekmoviĝas... ni vojaĝas.

●|| Tra belaj ĉirkaŭaĵoj ni veturas; tra urboj kaj vilaĝoj, trans riverojn kaj preter lagoj. Jen montriĝas herbejoj kaj grenkampoj, jen erikejoj kaj arbaroj.

Ne pensu, ke tia vojaĝo estas enuiga aŭ longedaŭra. Ĉiam trovas niaj okuloj ion belan aŭ interesan.

Jen, ni jam pasas Harburgon, proksime al Hamburgo, kie ĉe la hotelo jam atendas nin niaj tieaj gesamideanoj.

Sub ilia gvidado ni rigardas kelkajn vizitindaĵojn de ilia urbo; i.a. la havenon kun tunelo, la urbdomon kaj Alsteron, iun lagon meze de la urbo, vizitinda pro la belegaj rigardoj. La sekvanta tagon ni vojaĝas plue; denove tra samaspektaj, sed nun ondiĝantaj regionoj, baldaŭ ne plu germanaj, sed danaj. Iom post iom pli onda iĝas la tereno. Jen ni troviĝas supre kaj rigardas vastan, varian, multkoloran ĉirkaŭaĵon.

Post rapida malsupreniro ni estas en valo kaj rigardas time la ŝajne krutegan deklivon de la nova monteto aŭ en la profundaĵon tuj apud la vojo, je la transa deklivo dense surkreskita de koniferoj.

●|| Tiel ni veturas; rapida malsupreniro, malrapida supreniro; rigardo vasta super la ĉirkaŭaĵo, rigardo malvasta kontraŭ la ĉirkaŭantaj deklivoj. Ni alproksimiĝas al Aarhus, nia provizora celo, kie ni renkontos la aliajn karavanojn... Danoj, Svedoj, Angloj, Aŭstroj... Nederlandanoj! Ĉie sur la trotuaro esperantistoj, starantaj kaj promenantaj, parolantaj kaj gestantaj,

ĉirkaŭataj de granda aro de scivoluloj kaj interesatoj kaj dub-suspekte rigardataj de policisto, kiu fine venas al ni por serĉi biciklon, kiun unu el la karavano perdis....

Fine ĉio estas aranĝita; novaj salutoj! novaj bondeziroj! Kune kun niaj alilandaj gesamideanoj ni „for-veturas“ la lastajn kvindek kilometrojn. Tiam nova kaj lasta eliro; ni alvenas en la „Kampo Fuglsö“, la restadejo en bela ĉirkaŭaĵo, apudmarborda.

●|| Tra la manĝejo aŭdiĝas la voĉo de la gvidanto: Nederlando! Norvegujo! Francujo! Hungarujo!.... ĉiam sekvata de mallonga paŭzo, en kiu pli aŭ malpli granda aro da homoj ekstarante prezentas sin. Ĉeĥoslovakujo! Anglujo! Svedujo!.... dekonufoje sonas la voĉo de la gvidanto. Aŭstrujo! Germanujo!.... dekonufoje ekstaras grupo da partoprenantoj. Danzigo! Danujo!.... El cent kvindek buŝoj, parolantaj dekonu lingvojn, poste aŭdiĝas la esperanta himno:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko.

.....
Sub la sankta signo de l'Espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj.

●|| Laŭdire ni, nederlandanoj, estas gastamaj. Eble! Sed mi spertis, ke tiaj estas ankaŭ la Danoj. Estas dum la ekskurso al Ry, kie ni vizitas la konatan popolaltlernejon.

Laŭ nia plano ni poste boatveturos sur la apudaj lagoj, tamen.... ekpluvas! pluvegas! pluvegadas! Torento da akvo falas sur nin....

Ni decidis ne boatveturi, sed pasigi la restantan tempon ĉiu laŭplaĉe.

En tiu-ĉi momento la lernejestro ekstaras kaj proponas al ni reiri al la lernejo, por ke ni kune kun la lernantinoj trinku la kafon, se ni deziras tion. Kompreneble ni akceptas.

Ni do reiras kaj post kelke da tempo altabliĝas. Sed anstataŭ kafo sur la tablo troviĝas kompleta tagmanĝo. Evidente tio ankoraŭ ne estas sufiĉa, ĉar sekvas ia ov-manĝaĵo kun legomo kaj.... jes! efektive! jen la k a f o.... kun pano kaj torto.... Leganto aŭ legantino, mi petas, imagu: ni trinkis k a f o n ! Jen ekzemplo de la dana gastamo.

●|| Ĉiutaga problemo por niaj kompatindaj nederlandaj stomakoj estis la manĝaĵo, kies gusto la langon ĉiam transformis en demandsignon.

La nederlandaj samideaninoj ĝenerale ne povis klarigi, kiun produkton de nia kara tero ni formaĉis; ili eĉ kelkfoje apenaŭ povis diveni tion.

Tial ni plej ofte tuj turnis nin al niaj danaj gesamideanoj, por ke ili informu nin pli detale.

Mi tamen devas konfesi, ke ni jam baldaŭ iomete alkutimiĝis kaj ke ĉiam niaj stomakoj tute kontentiĝis. Precipe la avena kaĉo kaj la t.n. „ruĝa grio kun kremo“ ege plaĉis al ni.

Interesaĵo eble estas, ke ĉiam estis varma kaj malvarma manĝaĵoj sur la tablo; samtempe aŭ unu tuj post la alia.

●|| Iu dana vespero en la gimnastikejo.

La Danoj prezentas unu el siaj viglaj kaj ritmaj popoldancoj, la: „Saltu Gine”.

Baldaŭ ankaŭ la eksterlandanoj ekzercas ĝin.

Dum la unuaj provoj oni tute ne laŭtakte kaj absolute mal-elegante levas la piedojn, sed iom post iom tio pli-malpli pli-boniĝas.

En la fino de la ekzercado oni plilaŭtakte jam levas elegante la piedojn kaj majstre eĉ „Gine-n”.

Kaj al „Gine” kompreneble plaĉas tiaj lertaj dancemuloj; almenaŭ kelkaj duope ekzercis plu laŭ takto de iu malnova kaj tre konata melodio....

Jes, la dancvesperoj fariĝis kompleta sukceso. Kiel eta kompare al ili estis la sukceso de la multaj kaj pen-plenaj klopodoj de la afablaj kaj ĉiam servemaj „kuirej-princinoj” karesi nin.... ehe! pardonu! per siaj kuirproduktoj....

●|| Tra mia kapo iras memoroj; unu post la alia. Memoroj pri multo da okazintaĵoj; memoroj pri ekskursoj kaj promenoj, parolad- kaj kanthoroj, memoroj pri momentoj amuzaj kaj sole-naj. Kelkajn mi priskribis; estas ankoraŭ multaj aliaj.

Kune kun tiu torento da okazintaĵoj forflugis la tempo rapide; multe tro rapide.

En unu momento ni ekkonsciiĝis:

Hodiaŭ la lasta vespero! Morgaŭ la fino, la lasta „ekskurso”, la komuna forveturo al Aarhus.

Merkrede, la 28-an de Julio.

Cent kvindek geesperantistoj atendas la aŭtobusojn. Jen! ili venas! Fortaj manoj rapide metas la pakaĵojn sur la aŭtobusojn, la aliaj sidiĝas en ili.

Ankoraŭ unu momento.... tiam la aŭtoĉaroj malrapide ek-moviĝas. Ankoraŭfoje ni ĵetas rigardon al la konstruaĵoj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj.

Jen la kampo; kampo Fuglsö!

Plurajn tagojn ni estis kune tie, ni, „reprezentantoj” de dek unu popoloj, kun dek unu gepatraj lingvoj.

Plurajn tagojn „kampo Fuglsö” estis la loko, kie renkontis ili unu la alian, parolante nur unu lingvon, kvazaŭ ne ekzistus „muroj de miljaroj” kaj „popoloj dividitaj”.

Plurajn tagojn „kampo Fuglsö” estis „Esperantujo”, kaj nun ĝi finiĝis....

La kampo, la kunestado, jes!

La memoroj, la ideo: „Esperantujo” neniam!!

T. Boersma.

Het Hulpboekje.

**In handen zelfs van leken
Doet het de leerling spreken.**

ONS EIGEN TAALBLAD „LA STUDANTO“.

●|| Vrienden, het is gelukt. Schreven we in het Juli-nummer van „N.E.“, dat we hoopten, het mooie getal van 100 abonné's te mogen boeken, thans kunnen we berichten, dat onze verwachtingen verre zijn overtroffen. Geen 100, maar ruim 200 leden zonden hun abonnement in. Een eresaluut moeten we hier brengen aan onze afdeling Rotterdam, die alleen 53 abonnementen inzond. Hartelijk dank, Rotterdamse vrienden! Dat andere secties dit voorbeeld volgen!

Financieel is de eerste jaargang reeds verzekerd. Maar dat neemt niet weg, dat daarom het aantal abonné's niet voor uitbreiding vatbaar zou zijn. Integendeel, nu het seizoen weer voor de deur staat, verwachten we, dat het aantal abonné's verdubbeld zal worden. *Dat kan en dat moet.*

●|| Wanneer ge dit leest, hebben de abonné's het blad reeds in hun bezit. We hopen, dat de inhoud naar genoegen zal zijn, al moeten we tot onze spijt voor één ding clementie inroepen. De cyclostyleer-machine heeft n.l. nu en dan kuren vertoond, waardoor hier en daar de tekst niet erg duidelijk overgedrukt is. Voor het tweede nummer zullen we zorgen, dat het euvel verholpen is.

Nu nog even een woord aan de medewerkers. Vrienden, gaarne ontvangen we de copie voor het volgend nummer *vóór 1 October a.s.*

De Redacteur.

KONSOLO.

1. Ineto mia
Melankolia,
Ne ploru plu.
Alportos lumon,
Sunpalpebrumon
Matena fru'.

2. La noktmalvarmo
Kaj koro-larmo
Ja iros for.
En taga helo
Aperos belo,
Pli gaja hor'.

3. Ne pensu ĉiam,
Ke plu neniam
Rebrilos lum'.
La vivo ŝanĝas,
Surprizaranĝas;
Do, for cerbum'.

4. Eĉ hor' amara
Valoras, kara,
Sur vivovoj',
Ĉar, pro kontrasto,
Post longa fasto
Plej ardas ĝoj'.

11-VIII-'37.

S. S. de Jong Dzn.



AMERSFOORT. Notu Bone: Nia estraro ŝanĝiĝis.
Prezidanto estas nun S-ro De Vries. A.
Sekretario S-ro J. de Way Sr., Sint-Radboudstraat 4.

HILVERSUM. La 21-an de Septembro klubkunveno en „La Bela Loko”, Boombreglaan 15a. Ĉiu vizitu ĉi tiun unuan kunvenon en la nova sezono. Post la afera parto interesa programo, i.a. paroladetoj kun lumbildoj pri feriaj ekskursoj k.t.p.

REDAKCIA POŝTOSAKO



L. S. en O. B. Z. Ricevis ĝin kaj se eble uzos. Salutojn kaj ĝis revido.

S. J. IJ. en Batavia. Dankon. Proza parto baldaŭ aperos. En poemoj mi dronas. Korsaluton!

S. A. en A'damo. Tiun nedokumentitan plendon ni ne povas enpresigi. Turnu vin al la koncerna komitato.

S. U. en S. Ne plu cerbumu pri tio. Solvon hodiaŭ trovis. Malkaŝo okazos poste. Manpremon.

Al ĉiuj. La redaktoro ne iris al Varsovio kaj ĝis nun ne ricevis raportojn pri la kongreso jubilea. Eble ni en la venonta numero povos iom raportti.

VERDLANDO VOKAS



Nederlandaj horoj — Nur bone aŭdeblajn staciojn.

SABATON, la 11-an de septembro:

17.30—17.45 Hilversum II, K.R.O., 301 m.: Informoj de P. Heilker.

19.20—19.40 Roma, 420 m.: Parolado pri italaj belaĵoj.

DIMANĈON, la 12-an de septembro:

9.30—9.45 Kortrijk, 204 m.: Esperanto-kroniko de G. Debrouwere.

9.50—10.20 Lille, 247 m.: Kanto, informoj, kurso, diktaĵo, rakontoj.

LUNDON, la 13-an de septembro:

19.05—19.20 Montpellier-Languedoc, 224 m.: Esperanto-kroniko de A. Capoulade.

MARDON, la 14-an de septembro:

18.20—18.35 Moravska Ostrava, 269 m.: Parolado.

20.20—20.30 Tallinn, 410 m., Tartu, 579 m.: Informoj.

21.50—22.05 Kaunas, 1935 m., Klaipeda, 531 m.: Informoj.

MERKREDON, la 15-an de septembro:

14.20—14.40 Paris P.T.T., 431 m.: Konstanta kurso de C. Rousseau.

SABATON, la 18-an de septembro:

± 16.30 Hilversum I, V.A.R.A., 1875 m.: Esperanto-duonhoro.

19.20—19.40 Roma, 420 m.: Turisma Parolado.

20.25—20.35 Lyon P.T.T., 463 m.: Informoj por la Blinduloj.

DIMANĈON, la 17-an de septembro:

Vidu sub 12-IX-'37. — Krome:

15.20—15.45 Radio-Wallonia, 201 m.: Kroniko de A. Tassin.

23.00—23.30 Hilversum II, K.R.O., 301 m.: Parolado de Sigismundo Praga-
no: „Moroj kaj kutimoj en Rumanujo”.

LUNDON, la 20-an de septembro:

19.05—19.20 Montpellier-Languedoc, 224 m.: Kroniko de A. Capoulade.

MARDON, la 21-an de septembro:

Vidu sub 14-IX-'37.

MERKREDON, la 22-an de septembro:

Vidu sub 15-IX-'37.

SCIIGOJ KAJ PETOJ :

Unua internacia relajso de Esperanto-programo. — Jaŭdon, la 7-an de oktobro, la franca ŝtata radiostacio Lyon P.T.T. relajzos la Verdun Stacion en Erno (Ĉeĥoslovakio) por la elsendo de la esperantlingva traduko de la opero de B. Smetana: „La kiso”. La dissendo okazos de 21.50 ĝis 22.50 laŭ nederlanda vintra tempo. Estos la unua fojo, ke arta esperantista programo estos radiodisaŭdigata el Francujo kaj estos ankaŭ la unua fojo, ke esperantista programo estos relajzata internacie. Diskonigu la novajon! Post aŭdado skribu al la stacio: Lyon P.T.T., 47 Cours Gambetta, LYON, 3^o (Francujo).

Debato pri Esperanto kaj Radio en la Brita Parlamento. — Lastatempe petis s-ro C. Stephens la Generalan Poŝtestron instigi B. B. C. aranĝi Esperantlingvan programeron de tempo al tempo, ĉar multaj personoj interesiĝas pri la lingvo. Kelkaj parlamentanoj kaj la Poŝtestro parolis. Denove oni priparolos la demandon je la fino de la nuna parlamenta periodo.

Radio-konkurso de Roma. — En la 3-a konkurso gajnis por Esperanto la 1-an premion s-ro A. de Maertelaere, Gent (Belgujo) kaj la 2-an premion s-ro d-ro W. Solzbacher, Béraldange par Walferdange (Luksemburgo).

Jam nun oni certigas la amikojn de la „KRONIKOJ”, ke la 28-an de oktobro 1937a la Ĝenerala Direkcio por Turismo malfermos la 4-an konkurson, kiun devos partopreni la tuta eŭropa Esperantistaro. Ĝia regularo estos pli simpla, la premioj pli multnombraj kaj ĉiuj havos pli multe da ŝancoj por atingi la venkon. Nu, ne dizertu la estontan konkurson, kontraŭe, partoprenu kaj partoprenigu ĝin, tial ke Esperanto akiru la plimulton de la konkursontoj kaj ĉiam pli gravan rangon inter la ceteraj lingvoj. La Direkcio dankas ĉiujn konkursintojn, kiuj anoncis sin kiel partoprenintoj, kaj certigas ĉian helpon al la premiitoj de la 3-a konkurso dum ilia restado en Italujo.

La Esperantistoj havos la Radiodissendojn, kiujn ili meritos! — Do, KION VI DEVAS FARI? Jen diversaj manieroj. Uzu la plej multajn!
Agado al la radiostacioj:

- 1^o) — al la stacioj, kiujn vi aŭdis. Post aŭdado de esperantlingvaĵoj:
 - a) — vi skribu dank-poŝtkarton (eble je reduktita tarifo, se vi skribas nur 5 vortojn, la daton, vian adreson kaj subskribon) aŭ leteron, kiun vi adresu rekte al la stacio.
 - b) — aŭ skribu gratulan leteron, kiun vi subskribigu de kiom eble plej multaj personoj, kiuj samtempe skribu legeble sian nomon kaj adreson.
- 2^o) — al la stacioj, kiujn vi povas kapti, sed se vi la E.-dissendojn ne aŭdis: agu same, sed nur se vi estas certa, ke la esperanta dissendo okazis. Se vi dubas pri la okazigo, sendu leteron pere de ni, kiuj kontrolos kaj transsendos. (Ne forgesu la poŝtmarkojn!) —
- 3^o) — al la stacioj, kiujn vi ne sukcesis kapti: gratulu, esprimante vian bedaŭron ne ankoraŭ ilin kapti kaj esperon ke ili plipotenciĝos.
- 4^o) — al la stacioj kiuj ne dissendas esperantlingve: petu Esperantlingvajn programerojn.

Ĉiu esperantista grupo devus havi radio reportanton. Tiel la agado estus efika.

Internacia Federacio de Radio-Esperantistaj Asocioj kaj Delegitoj, IFREAD. — Ĝi bezonas delegitojn en ĉiuj landoj. Interesatoj nepre skribu tuj al la Radio-Klubo Esperantista de Francujo, 26 avenue Dode de la Brunerie, Paris, 16^o, Francujo.

Bonvolu frutempe sendi detalajn informojn al ĉi suba adreso. Anticipe dankas :

RADIO-SERVO L.E.E.N., Frans Halsstr. 41, Huizum (Fr.), Nederlando.

LIBREJO EDELMAN - BARENDREGT
Da Costaplein 14 - Tel. 83879 kaj 83897 - Amsterdam
(A. H. DE RUYTER)

Provizo da Esperanto-verkoj. Vasta sortimento de Esp.-lernolibroj.
Rapida liverado tra la tuta landa. Laŭdezire facilaj pagkondiĉoj.



*En, monato septembro
Ekfervoras grupmembro.
Amundurnas, aklamas,
Ĝed ĉu legi li amas?
Ĝi, dum liaj amuzoj
Malsategas la Muroj?
Ĝe li legi ne amas
La fervoro ja lamas*

Pli ol mil ilustritajn libropagojn egalas tutjara kolekto de nia sola literatura gazeto **Literatura Mondo**.

Abono por jaro f 4,50 ĉe **Libro-Servo L.E.E.N.** Specimeno kostas f 0,20.

LINGVO-LIBRO

informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj.

Abonprezo por jaro kaj tri ekzempl. kune sendataj gl. 0.80 ĉe **Libro-Servo L.E.E.N.**

LIBRO-SERVO L.E.E.N.

Pythagorasstraat 122, AMSTERDAM (O.).

Poŝtĉekkonto 90699 — Telefono 51379.

In aansluiting op onze mededelingen in het vorige nummer van dit blad, vermelden wij hieronder de prijzen van enige werken voor kandidaten voor het B-diploma, waarvan de bestudering door het examen-comité aanbevolen wordt.

	geb.	ingen.
Zamenhof, Fundamenta Krestomatio	2,15	1,65
Shakespeare, Hamleto		0,70
Orzeszko, Marta		1,65
Goethe, Ifigenio en Taŭrido		0,80
Schiller, La Rabistoj		1,—
Andersen, Fabeloj I, II, III		1,—
Gogol, La Revizoro		0,80
Baghy, Viktimoj	2,20	1,75
" , Sur Sanga Tero	3,55	2,75
Privat, Vivo de Zamenhof		1,50
" , Interpopola Konduto	1,80	1,30
Forge, Mr. Tot aĉetas mil okulojn	2,20	1,80
Jung, Landoj de l'fantazio	2,50	1,50
Nordenstreng, La homaj rasoj de la mondo	2,35	1,90
Weinhengst, Turstrato 4	2,10	1,50
Lanti, Naciismo		0,70
Engholm, Homoj sur la tero	2,10	1,50

Voor onze afdelingsbijeenkomsten kunnen wij aanbevelen: *Einar Dahl, Dialogoj kaj komedietoj* f 0,25 een verzameling originele, zeer eenvoudige en geestige toneelstukjes.

Uw eigen boekendienst levert *alle* leer- en leesboeken franco. Denkt aan de „EPOKO“-Libro-Klubo! Vraagt formulier.

